



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 2
1972

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
CEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
38-a (43-a) jaro
Monata

Jarraporto 1971

ESTRADO

La Ligo Konsilantaro konsistis de la jarkomenco el:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz
Vicprezidanto: Kjell Gustavsen
Generala sekretario: John Berggreen
Sekretario: Signe Korstvedt
Kasisto: Karl Ekhaugen
Estraranoj: Olav Rygg, Kirsten Ek
Anstataŭantoj: Harda Danielsen, Alfred Skyberg, la 3a loko vakis.
Ceteraj konsilantaranoj: Lars Kåre Hunnes, Trondhejmo; Steffen Kjetland, Haugeund; Per Johan Krogstie, Løten; Elna Matland, Sauda; Herolv Olsen, Tromsø.
Revizoroj: John Selbekk, Karin Sandberg.

La Landa Kunveno 29.—31. Majo reelektis la tutan estraron kaj la ceterajn konsilantaranojn, sed kiel anstataŭantoj elektigis: Harda Danielsen, Otto Prytz, Nils Chr. Stenseth. Ĉar Karin Sandberg ne deziris reelekton, kiel revizoroj elektigis John Selbekk kaj Aslaug Refsing.

Landa Kunveno okazis 29.—31. Majo en Trondhejmo dum la 42a Norvega Esperanto-Kongreso, kiu samtempe celebris la 60-jaran jubileon de la Ligo. La kunveno i. a. elektis Halvdan Karterud honora membro, akceptis rezolucion al la norvegaj junularaj organizaĵoj kaj alian al la distriktoj, kluboj kaj membroj pri la laboro pri la junularaj organizaĵoj. Oni ankaŭ decidis sendi leteron al U.E.A. pri la tro altaj kotizoj de la Universalaĵ Kongresoj.

ADMINISTRADO

Estrarkunveno. Okazis 7 estrarkunvenoj (7 en 1970) kaj unu neformala estrarkonferenco, kaj oni protokolis 86 punktojn (90 en 1970).

Cirkuleroj. La Estraro elsendis al la kluboj kaj distriktoj 5 cirkulerojn, i. a. kun invito al mendo de donac- kaj propagandabonoj al Norvega Esperantisto, kaj pri kursoj kaj studrondoj. Cetero oni publikigis informojn al la membraro en la rubriko «Sciigoj de N.E.L.» en Norvega Esperantisto. 4 el la cirkuleroj estis sendataj ankaŭ al la rektaj membroj.

Oficejo. La tenado de la oficejo en General Birchsgt. 30 estas ebla nur per la malavara subtenado flanke de membroj per la oficeja fondaĵo (kontorfondaĵo). Pluraj pagas libervolan monatan aŭ jaran kontribuon. La oficejo servas samtempe por Eldonejo Esperanto A/S kaj por Klubo Esperantista en Oslo, kiuj pagas parton de la luprezco. La translokigo plenumigis en Januaro, sed dum la tuta jaro oni efektivigis diversajn plibonigojn, kompletigojn k.t.p. La malnovan oficejon en N. Slotsgt. 3 oni intencas utiligi por la biblioteko. La oficejon estris precipe la prezidanto. Estis regula deĵoro tie dufoje semajne. La laboron dividis inter si la estraranoj. La Ligo, la Eldonejo kaj la Klubo havas komunan telefonon.

La Oficeja Fondaĵo dum la jaro donace ricevis kr. 1 709,75 (en 1970 kr. 2 048,03). La Estraro kore dankas al la kontribuintoj.

La Financa Komisiono, konsistanta el Kirsten Ek (prezidanto), Johan Matland, Alfred Skyberg (membroj) ankaŭ dum 1971 ne laboris.

Kampanjo Reisæter. Laŭ iniciato de Trygve Reisæter kaj Elna Matland oni komencis kampanjon por starigi bazan kapitalon de kr. 30 000 per varbado de 100 personoj pretaj donaci po kr. 100 jare dum 3 jaroj. La unuaj kontribuoj jam alvenis.

Kunlaboro kun N.E.F.A. Daŭre bone funkcias la interkonsento kun Norvega Esperantista Fervoja Asocio. Ĝi disponas unu paĝon en ĉiu numero de Norvega Esperantisto kiel sian oficialan organon, ĉiuj membroj de N.E.F.A. estas abonantoj de Norvegaj Esperantisto, kaj la kazo de N.E.F.A. pagas kr. 500,00 kiel kontribuon al la preskostoj.

DISTRIKTOJ, KLUBOJ kaj MEMBROJ

Distriktoj. Precipe Okcidenta Distrikto bone laboris, Orienta, Meza kaj Nordlanda Distriktoj estis malpli aktivaj. — Nord-Nordvega Esperantisto-Distrikto ne funkcias.

Klubo. Je la jarfino 1970 N.E.L. havis 17 aliĝintajn klubojn. Neniu klubo fondiĝis kaj neniu malaperis. Je la jarfino N.E.L. sekve havis 17 klubojn.

Membrostatistiko:

Bergen, La Esperantoklubo de, Ok.D.	23
Bodø Esperantoklubb, N.D.	11
Gjøvik Klubo Esperantista de, Or.D.	5
Halden, Ascendo, Or.D.	9
Hamar, La Norda Stelo, Or.D.	15
Harstad, Noktomeza Suno, N.N.E.D.	5
Haugesund, Mara Vento, Ok.D.	50
Jørpeland, Pacaj Batalantoj, Ok.D.	5
Kristiansands Esperantoklubb	14
Løten, La tri verdaj steloj de, Or.D.	8
Mo, La Esperantoklubo de, N.D.	5
Odda, La Glaciaro, Ok.D.	5
Oslo, Klubo Esperantista en, Or.D.	148
Sarpsborg, La Urso, Or.D.	16
Sauda Esperantoklubb, Ok.D.	15
Tromsø, La Norda Lumo, N.N.E.D.	8
Trondhejmo,	
Grupo Esperantista, M.D.	26

Sumo: 368

Individuaj membroj 133

Entute: 501

La mallongigoj post la nomoj de la kluboj montras la distrikton, al kiu la klubo apartenas.

Specifo de la membraro laŭ kategorioj:

Klubanoj:	
Ordinaraj	267
Junulaj	21
Familiaj	54
Junaj familiaj	12
Honoraj	2
Dumvivaj	2
Subtenantaj	10

— 368

Individuaj membroj:

Rekte aliĝintaj membroj	
ordinaraj	97
Rekte aliĝintaj membroj junuloj	10
Rekte aliĝintaj membroj familiaj	5

— 112

Dumvivaj membroj 11

Subtenantaj membroj 10

Entute: 501

Klubanoj (Oslo) aliĝintaj dum la 4a jarkvarono, ne pagintaj kotizon por 1971 3

504

Krome pagis 2 kontribuaj membroj. — Entute la membronombro montras mal-kreskon de 6 membroj, t.e. 1,2% kompare kun la antaŭa jaro.

KLUBLABORO

Superrigardo. (Ĉar nur 11 el la 17 kluboj ĝis nun sendis ĉiujn devigajn raportojn, kelkaj el la subaj ciferoj certe estas tro malaltaj.) Suma membronombro je la 1/1 1971: 374. Aliĝoj: 27, ekŝigoj: 33. Membronombro je la 31/12: 368. — Okazis 117 klubkunvenoj, meznombro ĉeestis proks. 56%; estas raportita 100-

(Daŭr. p. 21)

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—, 1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—, 1/8 p. kr. 20,—.

Printempo

La vintro finiĝis. Dum la mallumaj vesperoj, kiam la televido ne ŝtelis niajn liberajn horojn, ni eluzis la tempon por perfektigi nian scion pri Esperanto.

Ni studis la gramatikon, ni korespondis, ni legis literaturon. Ni demandis Esperantajn librojn en la komunumaj bibliotekoj. Ni informis pri la Internacia Lingvo.

La printempo estas la sezono de preparado. Same kiel la tuta naturo, ankaŭ ni pretigas nin por la somero. Ni aliĝas al kursoj kaj kongresoj: Frostavallen, Helsingør, Portland. Aŭ pensas jam pri la venontjara UK en la jugoslavia ĉefurbo.

Ni eluzos niajn sciojn.

Sed ni daŭrigas la legadon. Ni deziras ĉi tie inviti ĉiujn al studado de la jam tre riĉa Esperanta literaturo, kiu estas fonto de plezuro al tiu, kiu volas ĉerpi.

Bonan printempon!

LA KONTORFONDAJO 1971

Pli frue	kr. 1 356,35
O. Rygg	» 67,00
K. Kluge	» 20,00
C. Thorsen	» 5,00
Aa. Falch	» 6,40
Turisma Servo	» 25,00
H. Danielsen	» 250,00

kr. 1 729,75

LA KONTORFONDAJO 1972

Torstein Andersen	kr. 25,00
Gustav Ringstad	» 10,00
C. S. B.	» 20,00
S. Ebeltoft	» 4,00
O. Rygg	» 100,00
H. Danielsen	» 21,00
Sauda Esperantoklubb	» 30,00
I. Dahl	» 50,00

kr. 260,00

KAMPANJO REISÆTER

Pli frue	kr. 400,00
J. Berggreen	» 100,00
Aslaug Refsing	» 100,00

kr. 600,00

LA PROPAGANDA FONDAJO 1972

Turisma Servo	kr. 150,00
---------------	------------

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

SUBTENANTAJ MEMBROJ 1972

W. Hortmann	
Sigrun Mæland.	

SCIIGOJ DE N. E. L.

Norvega Esperantisto kaj la kotizo. Ĉiujare kelkaj membroj pagas sian kotizon tre malfrue en la jaro, ofte nur post pluraj urĝigoj. Tio estas grava malhelpo por ni. Tiu ĉi numero de la gazeto estas la lasta, kiun ni sendas al nepagintaj membroj, klubaj kaj rektaj. Kiam ni poste ricevos la kotizon, ni postsendos la numerojn, kiujn la koncerna membro ne ricevis, sed ĉar ja estas maloportune ricevi kelkajn malnonajn numerojn kune, estas konsilinde pagi la kotizon frue, kiel postulas la statuto. Tio ankaŭ ŝparas al ni multe da nenecesa ekstra laboro.

Taskotabelo por kluboj. — *Aprilo:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas al N.E.L. kaj al la distrikto kotizon kaj liston pri la malfruigintaj kaj eventualj novaj membroj.

Majo: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro diskutas la aŭtunan laboron kaj starigas planojn pri kursoj kaj aliaj aktivecoj.

La Liga Estraro.

Frostavallen

Frostavallen estas tre ĉarma loko en Svedujo (en la plej suda provinco Skanio), kie plurfoje okazis la konataj preleg-semajnoj laŭ nomo Sveda Somera Semajno. Tia semajno (aranĝos Sveda Esperanto-Instituto) ĉijare okazos sub la aŭspicioj de UEA 30. julio—6. aŭgusto 1972 (do tuj post la kursoj en la apuda Helsingør). Prelegos D-roj I. Lapenna, Londono, W. Bormann, Hamburgo, J. C. Wells, Londono, kaj s-ro J. Thierry, Parizo, pri la ĉefa temo «La problemoj de Lingva Komunikado en la Moderna Mondo — kun speciala atento al la situacio en Eŭropo.» Krome diskutoj pri la laborprogramo de UEA. Petu rapide informojn kaj aliĝilojn de s-ro Jan Strønne, Amiralsgatan 36, S-211 55 *Malmo*, Svedujo. Ni forte rekomendas fruan aliĝon por ke vi estu certa pri loko en la hotelo.

Jarkunveno de danaj esperantistoj

La jarkunveno de danaj esperantistoj okazos ĉijare la 6an kaj 7an de majo en *Hotelo Dania* en Silkeborg.

Silkeborg situas en tre bela regiono de jurlando, la plej granda rivero en Danio trafluas la urbon kaj ne estas longa distanco inter la kunveno kaj la lago kaj rabaro. Ankaŭ eksterlandaj gesamideanoj estos bonvenaj pasigi belan semajnfinojn kaj partopreni la kongreson.

Skribu kaj petu programon kaj detalajn informojn ĉe

Silkeborg-Esperantoklub

Chr. Hesel

Drejovej 14

DK 8600 Silkeborg

Danlando

N.B. Lasta dato por aliĝo 15an de aprilo.

Korespondo kun Willy Brandt

Trygve Müller, la Delegito de U.E.A. en Jørpeland, en Decembro 1971 skribis al Federacia Kanceliero Willy Brandt, gratulante lin pri la aljuĝo de la Nobel-premio de paco. Samtempe li utiligis la okazon informi lin pri Esperanto kaj peti lin utiligi sian influon por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj en la interŝtatajn organizaĵojn. Li ricevis jenan respondon (ni tradukas el la germana):

«Tre estimata s-ro Müller!

La sinjoro Federacia Kanceliero kun plezuro dankas vin kore pro via letero de la 10a de Decembro 1971, kie vi esprimas vian ĝojon pro la aljuĝo de la Nobel-premio de paco. Estu ankaŭ certigita, ke viaj pluaĵaj proponoj, precipe via peto subteni la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, estas notitaj kun granda intereso.

Altestime

laŭ komisiono

D-ro Dossmann (subskr.)»

ELDONEJO ESPERANTO INFORMAS:

Kvankam la granda Plena Ilustrita Vortaro aperis, ankaŭ la molnova Plena Vortaro kun Suplemento estas daŭre ricevebla. La prezo estas, kiel antaŭe, kr. 37,50.

Klublaboro (Daŭr. de p. 18.)

procenta ĉesto. — Raportigis 38 estrarkunvenoj, 15 festoj, ekskursoj k.t.p. En 2 kluboj laboris 4 studrondoj kun proks. 20 membroj. 6 kluboj raportas pri biblioteko kun 566 volumoj. 74 klubanoj posedas elementan ekzamenon, 48 superan, 3 instruistan.

La kluboj grandparte kontentige rapor-

tadis, sed la estraro ankaŭ zorge urĝigis pri mankantaj raportoj. — La intereso inter la kluboj grandparte ŝajnas esti bona.

Teatra Sekcio, gvidata de C. Støp-Bowitz, sendis distraĵojn al kluboj, kiuj petis pri tio.

FERIO KUN SENCO

Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu semajnon (22.7—29.7-72) en la feria centro KOSMOS en Danlando. Preleĝoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94—96, DK 20000 Kopenhago F., Danlando.

STUDLABORO

Kursgvidantoj. Neniu eksterlanda kursgvidanto agadis en la lando dum 1971, sed en kelkaj lokoj okazis kursoj gvidataj de lokaj fortoj.

Kursoj. Raportigis 7 kursoj por komencantoj kun sume 47 kursanoj en Kristiansand, Løten kaj Oslo, kaj 2 kursoj por progresantoj kun 15 kursanoj en Haugesund kaj Oslo. Kredble okazis ankaŭ kelkaj kursoj, pri kiuj raportoj ne estas ricevitaj, aŭ kiuj je la jarfino ankoraŭ ne finiĝis.

Korespondaj kursoj. La Sekcio pri Korespondaj Instruado estis gvidata de Else-Margrethe Müller, Trondhejmo. Estis bona kunlaboro kun «Folkets Brevskole», kiu uzas la kursojn de N.E.L., sed mem prizorgas administradon kaj anoncadon. N.E.L. havigas instruanton kaj ricevas raportojn pri lernantoj, kiu plenumas la kursojn ĉe «Folkets Brevskole». Ankaŭ

Norvega Blindula Asocio utiligas la kursojn. — Ĉe N.E.L. aliĝis al la unua parto 44 kursanoj, al la dua parto 11. Oni daŭre liveris la kursojn por reduktita tarifo al gejunuloj; 6 lernantoj en la unua kaj 1 en la dua parto estis tiaj. Ĉe «Folkets Brevskole» aliĝis al la unua parto 21 kursanoj, al la dua 2. — 2 kursanoj estas varbitaj de membro de N.E.L. Ĉiuj, kiuj penumis la unuan parton, kaj ne jam estis membroj, ricevis duonjaran abonon al Norvega Esperantisto kaj proponon pri membreco. — Instruis E. Holten kaj L. K. Hunnes, por gejunuloj Ludvig Anjer, por «Folkets Brevskole» L. K. Hunnes, por blinduloj H. Karterud. — La provizo de la kursleteroj de la unua parto estas parte elĉerpita, oni devis multobligi 3 el la leteroj. Tial la kurso ne estis anoncata kiel kutime en semajna gazeto. — Oni traktas kun «Folkets Brevskole» kaj kun presejoj pri presigo de nova eldono reviziita de L. K. Hunnes.

Gazeta kurso aperis en 1971 en neniu gazeto.

Perfektiga studado. La Ekzamena Komisiono ankaŭ dum 1971 korektadis taskojn por interesigantoj. Oni aparte klopodas igi la membrojn studi por ekzameno.

Ekzamenoj. Ordinara ekzameno okazis en Junio kaj en Decembro en Oslo. 4 kandidatoj plenumis la elementan ekzamenon, 2 la superan. La Ekzamena Komisiono konsistas el: C. Støp-Bowitz (prez.), Olav Rygg (sekr.), Eva Støp-Bowitz (kas.), Jens Schjerve kaj Elfrid Vormdal (membroj), Ekzistas 5 lokaj ekzamenaj komitatoj, nome en Bergen, Haugesund, Sauda, Trondheim, Østfold, kaj 6 ekzamenaj delegitoj ekster la komitatoj.

INFORMADO

Informa Fako (Komisiito pri Informado: Ludvig Anjer). La komisiito ne raportis ĝis la pretigo de ĉi tiu jarraporto.

La Propaganda Fondaĵo tute ne ricevis donacojn.

Bankinterzoj estis kr. 515,90. El la fondaĵo oni uzis kr. 1 412,50. La fondaĵo posedis je la jarfino kr. 9 421,80.

«*Esperanto-nytt*». Ankaŭ en 1971 la komisiito pri informado ne reaperigis tiun informbultenon.

Informbuloj. De «Det internasjonale språket — Esperanto» restas proks. 1 500, de la flugfolio proks. 7 000. — La faldfolio «Velkommen til Esperantobevegelsen» estas elĉerpita; ges.roj Sestak, Haugesund, pretigis ilustraĵojn por nova, reviziita eldono.

Gazetara Servo, gvidata de Elna Matland, elsendis al ĉiuj norvegaj ĵurnaloj 11 bultenoj kun sume 30 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj. Oni daŭre abonis eltondaĵojn per la firmao «Argus». Oni registris 287 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo, kaj 141 novaĵojn kaj 78 artikolojn, debataĵojn, referaĵojn el aliaj fontoj. Entute oni do registris 506 aperigojn (307 en 1970) en 107 gazetoj kaj revuoj (77 en 1970). — Atakoj al Esperanto estis tre malmultaj kaj tuj ricevis respondon.

Radio kaj televido. (Komisiito: Kirsten Ek.) En la regna radioprogramo jambo dum intervjuo raportis ke dum la jamboreo en Tokio li uzos Esperanton. Okazis du lokaj programoj po 10 minutoj, unu en «Vestlandssenderen» (Kjell Offerdal) kaj unu en «Stavanger lokal» (Trygve Müller). En la televido Tamiko Kaŭakami kune kun Astrid Mansrud aperis dum 5 minutoj en la programo «Har du en hobby?» Oni proponis al la Norvega Radio havigi kaj aperigi la nederlandan televidkurson de TELEAC, sed ricevis nur nebulan respondon, kvankam ne rektan rifuzon. Oni ankaŭ vane proponis «rondtablan» diskuton pri la mondlingva demando en radio aŭ televido. La Esperantaj radioprogramoj ne aperis en «Programbladet».

Intervistataj Organizaĵoj (Komisiito: R. Bugge-Paulsen). Pri la skandinavia propono al UNESKO evidente daŭre laboras la svedoj. La gvidadon de la Eŭropa lingvokampanjo transprenis d-ro Werner Bormann, kiu precipe okupiĝis pri enigo de apliko de Esperanto en la Eŭropan Komunan Merkaton. La komisiito denove kolektis proponantojn pri U.E.A. kiel kandidato por la Nobel-premio de Paco 1972, kaj planas revigligon de la kolektado de subskriboj i. a. inter parlamentanoj.

Blinduloj (Komisiito: Otto Prytz.) La

sonbenda eldono de Norvega Esperantisto, kiun prizorgis Kirsten Ek kaj Ludvig Anjer, havis 8 abonantojn, kaj Kluba Bulteno de Klubo Esperantista en Oslo estas daŭre surbendigata de John Berggreen por la blindaj membroj. Erling Anker Haugen finis la redaktadon de «Esperanto-Norsk grunnordbok», kaj la unua (el entute 3) volumo aperis en brajlo.

Skoltoj. La komisiito, Hans Amund Rosbach, skribis al partoprenantoj de la jamboreo en Tokio kaj al la skolta oficejo kaj la skoltaj ĉefoj, sendante «La Skoltan Mondon». John Berggreen gvidis kurseton por kelkaj vizitontoj al la jamboreo.

La Junulara Sekcio, gvidata de Nils Chr. Stenseth, ampleksas 46 membrojn, inter ili 14 junulaj membroj de Studenta Esperanto-Societo en Oslo. Estis daŭrigata la arango ke Kvinpinto, la organo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, estas organo ankaŭ de la norvega junulara sekcio. La Studenta Esperanto-Societo en Septembro aranĝis standon en la Universitato kun ekspozicieto de libroj kaj disdonado de flugfolioj, kio rezultigis malgrandan kurson. La societo estas grupo de Klubo Esperantista en Oslo.

Faksekcio por Instruistoj, gvidata de Astrid Mansrud, estis tute pasiva.

Esperanto en la lernejoj (prez. de la Komisiono por la Lerneja Kampanjo: C. Støp-Bowitz). Oni daŭre atendas iniciatojn de norvegaj instruistoj kaj lektoroj esperantistaj por akiro de permeso por eksperimenta instruado de Esperanto en siaj lernejoj. — En dua eldono de la propono pri nova «Normalplano por la baza lernejo» malaperis la mencio pri Esperanto kiel elekta temo, anstataŭe aperis mencio de la franca, rusa, hispana lingvoj. Johan Matland telefone sukcesis igi la estron de la «Komisiantaro pri la baza lernejo» promesi reenmeton de Esperanto.

Informaj prelegoj. Raportigis nur unu informa prelego en Sarpsborg, kun proks. 20 aŭskultintoj. Sed aldone Tamiko Kaŭakami aranĝis por si 25 prelegojn pri Esperanto kaj pri Japanujo en diversaj lernejoj en la Oslo-regiono, kiujn aŭskultis proks. 1 140 gelnantoj kaj iliaj geinstruistoj.

Ekspozicioj ne raportigis en 1971.

Kinej-reklamo. Ekde la 1-a de Majo la reklamplato laŭ desegno de Johan Matland estis montrata en la kinejoj de Bergen kaj Bodø.

DIVERSAĴOJ

Norvega Esperantisto. La redakcia komitato konsistis el Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg, kaj Hans Amund Rosbach, Kristiansund N. La gazeto estis redaktata ĉefe laŭ la samaj principoj, kiel en 1970. La «Fervoĵista paĝo» de N.E.F.A. en ĉiu numero, sub redakto de Odd Kolbrek, estis ŝatata legaĵo ankaŭ de nefervoĵistoj. La kunlaboro kun la presejo, A. Sæther, Hamar, estas bona, sed la numeroj ofte estas liverataj kun konsiderinda malfruo. La ekspedadon tre akurate prizorgis Randolph Grotmål. — Aperis 6 ordinaraĵoj numeroj 16-paĝaj kaj 2 «duoblaj» numeroj 16-paĝaj, sume 128 paĝoj. La enspezoj ne nur ne permesis eldonon de 10 plenaj 16-paĝaj numeroj, sed iom post iom fariĝis grava ŝarĝo por la budĝeto, kiu devis «subvencii» la gazeton per proks. kr. 2 000 jare. Sekve la Liga Konsilantaro decidis ekde 1972 transiri al aperigo de nur 6 ordinaraĵoj numeroj jare. Per sia «poŝtmarka iniciato» la ĉefredaktoro pli ol kovris la elspezojn de la redakcio.

«*Pro Merito*». Ordена promocio okazis dum la festeno de la 42a Norvega Esperanto-Kongreso en Trondheim, la 30an de Majo. La Grandan Krucon ricevis R. Bugge-Paulsen, Kavaliro de la 1-a klaso fariis Lars Kåre Hunnes, Kavaliroj de la 2-a klaso Kirsten Ek, Aslaug Karterud, Aslaug K. Næss, Oddmund Rykkvin, Ingolf Blikstad.

Biblioteko. La pruntedoneblaj libroj daŭre staras en la oficejo de N.E.L., la ceteraj estas sekure magazenitaj. La kresko de la biblioteko ĉefe rezultis el recenz-ekzempleroj, kiujn ricevis Norvega Esperantisto, kaj gazetoj ricevataj interŝange kun ĝi. Pruntedoniĝis 13 libroj.

Nordlanda kunlaboro. Nordlanda Esperanto-Komitato daŭre ne montris aktivecon. La Kunlabora Komisiono, konsistanta el la prezidantoj de la 4 landaj asocioj (dana, finna, norvega kaj sveda)

laboris precipe per korespondado kaj interŝanĝado de cirkuleroj.

«Reisetrafikkforeningen for Oslo og Omegn». La kunlaboro kun tiu asocio estas bona. Pluraj kopioj de ĝiaj filmoj «Bonvenon al Oslo» kaj «Oslo, la vikinga ĉefurbo» kaj de la diapozitivaj kun akompana prelega teksto daŭre cirkuladas en la mondo. Oni daŭre distribuadis la turistbroŝuron al petintoj en diversaj landoj.

Norvega Ŝtata Fervojo. Ankaŭ ĝia filmo «Mi estis tie» cirkuladas en la mondo, kaj oni helpis disvastigi ĝian broŝuron.

Turisma Servo de N.E.L., sub gvidado de Kirsten Ek, peris informojn kaj aliĝojn por la norvegaj anoj de la kongreso en Londono kaj aranĝis karavanon al la kongreso. — Aŭtune oni dissendis informojn pri la 56a Universala Kongreso en Portlando.

Internacia organizo. La kunlaboro kun U.E.A. estis kontentiga. Cefdelegito por Norvegujo estas Alfred Skyberg, Komitatano A por N.E.L. estas Ludvig Anjer, C. Støp-Bowitz estas Komitatano B. En 1971 estis 59 Delegitoj en 20 lokoj en Norvegujo. La nombro de Individuaj Membroj de U.E.A. estis 92.

56a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Londono. Aligis, laŭ la akiritaj informoj, 36 norvegoj. U.E.A. ne plu invitas registarojn, nur la lokajn ambasadorojn, kaj la norvega ambasadoro en Londono sendis reprezentanton al la inaŭguro. Reprezentanto de N.E.L. estis John Berggreen.

Prelegvojaĝoj ne okazis dum 1971.

Helpagado. Oni daŭrigas la kunlaboron kun Mocambiko kaj kun Esperantista Asocio de Madagaskaro.

«Vivo de Zamenhof». La transprenita stoko de la norvega eldono de Privat: «Vivo de Zamenhof» estas disvendata por kr. 3,00, sed la disvendado okazas malrapide.

Semajno de Internacia Amikeco. Ankaŭ en 1971 la arango vekis intereson inter la membroj en multaj lokoj.

Sliparo pri norvegaj esperantistoj. La sliparo ampleksas nun 10 065 slipojn pri esperantistoj en 787 lokoj.

Koresponda statistiko. N.E.L. kun ĉiuj sekcioj dum la jaro ricevis 1 226 leterojn kaj 711 presajojn kaj sendis 1 224 leterojn kaj 3 966 presajojn.

La intereso pri Esperanto ŝajnas esti kreskanta, se ni juĝu laŭ la nombro da informetoj, kiujn ricevas la oficejo post ĉiu iom rimarkinda okazaĵo, gazet-artikolo, debato en gazeto k.t.p. Niaj respondoj ofte rezultigis mendon de lernolibroj aŭ koresponda kurso. Ekĝemas ankaŭ intereso pri starigo de kursoj en novaj lokoj, t. e. lokoj, kie ne ekzistas kluboj. La tendenco al iomete pli vigla aliĝado al kursoj ŝajnas daŭri.

Konkludo. Tamen 1971 denove montras etan malkreskon de la membronombro, kiu nun estas danĝere malalta. Nia membraro konsistas nun ĉefe el maljunigantaj fideluloj. La perdo ne estas nenormale granda, sed la alfluo de novaj adeptoj estas tute malsufiĉa, kaj priplorinde multaj kluboj starigas kursojn. La kluboj devas grave reaktivigi tiurilate. Aliflanke espereble la vekiganta intereso en novaj lokoj povos almenaŭ kompensi la normalan perdon en 1972. Ni devas esti pli multnombraj por povi akcepti kaj adekvate eluzi la favoron, kiu kiam ajn povos aperi ekz. en la lerneja kampo.

la 31an de Decembro 1971

Oslo,

la 28an de Februaro 1972

C. Støp-Bowitz
John Berggreen

Kjell Gustavsen
Signe Korstvedt

Karl Ekhaugen

Olav Rygg

Kirsten Ek

La jarkalkulo aperos en la venonta numero.

LA KORESPONDAJ KURSOJ
(Afdeling for Brevundervisning)
Spezoj 1971.

<i>Enspezoj:</i>		
Kurskotizoj		980,50
Rentumoj		224,83

<i>Elspezoj:</i>		
Studmaterialoj kalkulitaj	588,00	
Kostoj	180,00	
Afranko	93,20	
Profito, al la kapitalo	344,13	
	<hr/>	<hr/>
	1 205,33	1 205,33

BILANCO JE 31/12 1971

<i>Aktivaĵoj:</i>		
En la kaso	4,89	
Postĝirkonto 100.33	2 742,98	
Poŝta ŝparkaso	2 136,12	
Forretningsbanken	4 181,63	
Studmaterialo	1 712,13	
 <i>Pasivaĵoj:</i>		
Kapitalkonto je 1/1 1972	10 433,62	
Profito 1971	344,13	
	<hr/>	<hr/>
	10 777,75	10 777,75

Årets balanse er satt opp etter kassa-dag-bok med bilag, som er revidert. Postgiro-Trondheim, den 29. januar 1972.

Else-Margrethe Müller
kasistino.

konto-oppgave og bankbøker er fremlagt og stemmer med ovenstående tall i status.

Erling Anker Hawgen
revizoro.

Recenzoj

El propra kaj fremda

Aŭtoro: Hans Amund Rosbach.
Mendebla ĉe la aŭtoro, adr.
Nergt. 37 c., N-6500 Kristiansund aŭ Norsk Esperanto-Forbund, Boks 942, Oslo 1.

Jen nova libro el la plumo de Hans Amund Rosbach. La modesta aspekto ne estu simptoma por la enhavo, kaj la facila vento disportu la paraŝutojn de

la leontodo, per kiu la fronto estas ornamita, vasten tra la mondo.

Kiel la titolo «El propra kaj fremda» indikas, la libro estas kvodlibeto de propra produktaĵo kaj tradukita literaturo, el poezio kaj prozo.


La temoj de la poemoj ampleksas vastan areon, de junula amo ĝis vivo de la pasero, la vagabondo de la strato kaj nia plej ŝatata flugila «dombesto». Same varia estas la aŭtorelekto: Bjørnson, Wergeland, Wildenvey, Garborg, Sivle,

(Daŭr. p. 27)

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstuppen 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



Ion pri la fervojlinioj en Norvegio.

LA FLÄMLINIO iras laŭ kruta, malvasta kaj belega montarvalo kaj estas majstroverko de inĝenierscienco.

La linio mezuras 20 km., sed la vojaĝo de Myrdal stacio, 887 m s.l.m., malsupren al Flâm stacio ĉe la Aŭrlandsfjordo daŭras proksimume 45 minutojn. La linio iras tra 20 tuneloj kun longeco entute 6 km. La plej granda ascendo estas 1 m en 18 m, kaj la diferenco de la alteco 865 m je 20 km longa distanco estas tute senkompara por ordinara fervojo.

Preterpasante la plej belajn elvidajpunktojn la trajnoj veturas malrapide aŭ faras haltojn por ke la vojaĝantoj vidu la plej multon de la grandioza naturo. Pro la granda ascend-rilato la vagonoj estas aplikitaj per 5 diversaj bremsiloj, per kiuj unuope oni povas haltigi la trajnon. Laŭ kelk-km longa distanco malsupren de Myrdal stacio la Flâmlinio iras tra lignotuneloj preskaŭ paralele kun la Bergenlinio. Ĉe Vatnehalsen oni havas imponegan elvidajn malsupren al la abismo de la valo Flâmdalen situante inter altaj montoj kun eterna neĝo kaj glacio. Belega vidaĝo aperas inter la akvofalo Kjosfossen kaj Baklitunelo laŭ 100 m longa distanco tute apud kaj antaŭ la grandega akvofalo, kiu laŭ pluraj terasoj ĵetiĝas malsupren inter malumaj montkrestoj, verde enkadrigitaj,

kaj malsupren en la sovaĝan ravinon kun fono de gigantomtoj. Por venkigi la 300 metran altecdiferencan laŭ la Myrdalsmonto la Flâmlinio ĉi tie estas konstruita en turnotunelo tiamaniere, ke laŭ rekta distanco de 1 km la linio iras en 5 terasoj. La plej longa tunelo de la linio estas Nâli, 1 350 m longa. Antaŭ ol la trajno iras en la tunelon aperas la eble plej fantazia elvidaĝo de la linio. En 3 terasoj supren laŭ la kruta montmuro oni vidas la linion (la trajno staras sur la 4a teraso). Samtempe oni vidas la landstraton kiu laŭ 21 akraj kurboj serpentumiĝas supren laŭ la Myrdalsmonto. Ĉi tiu vojo konstruiĝis en la jaroj 1895—96 por provizi ĉion, kion oni bezonis dum la konstruado de la Bergenlinio trans la altmontaro.

Ĉe Hâreina la valo vastiĝas, kaj oni vidas multajn belajn bienojn kaj Flâm preĝejon en la valfundo, kaj la monton Vibnesnosi kaj la akvofalo Rjoandefoss situas proksime de ĉi tie.

Inter 1000 m altaj montoj ŝirme situas Flâm stacio ĉe la fino de Aŭrlandsfjordo — brako de la plej longa fjordo de Norvegio — Sognefjordo, kiu tranĉas sin pli ol 180 km en la landon. La fruktĝardenoj en Flâm atestas pri la varma fjordklimato. En la Flâmrivero, kiu fluas en la fjordon tute apud la stacio, naĝas salmoj kaj martrutoj dum la somero.

La trajnoj de kaj al Flâm veturas

korespondante kun la trajnoj laŭ la Bergenlinio kaj kun la laŭhorare veturantaj ŝipoj de kaj al Flâm. La aŭtobusinterligoj estas bonaj; estas tutjara interligo kun Aŭrland kaj Vassbygdî kaj laŭ la nova vojo Aŭrland—Lærdal estas aŭtobusinterligo somere.

El propa (Daŭr. de p. 25)

Obstfelder kaj Petter Dass. Eĉ J. H. Wessel kun sia senmorta «Hundomurdo». Inter la poemoj estas ankaŭ kristnaskaj kantoj kaj psalmoj.

La proza parto estas same varia, kun temoj el la sagao kaj nia riĉa popolfabelaro. Kristnaskaj legendoj de aŭtoroj skandinavaj: Falkberget, Selma Lagerlöf, Kaj Munk kaj fine novelo de Torolf Elster: «Mateno en la strato de Eilert Sundt», kiu donas materialon por pripensoj.

Kaj nun kelkaj notoj. «Løftningen» estas en la malantaŭo de viking-ŝipo kaj povas esti tradukata per «alta poŭpo» aŭ «Malantaŭo». En la bibliaj nomoj mi preferus neesperantigon en la lok- kaj personnomoj, Nazaret, Salomon, Golgoto k.s. aŭ kiam esperantigitaj: Nazareto, Salomono . . . La konjunkcio «dum» signifanta daŭron, mi multloke anstataŭus per «kiam» en la popol-fabeloj, kiam temas pri tempo-punkto. La eŭfonian «o» en kunmetitaj vortoj mi forstrekus, se ne estas absolute necese. Do: ŝnurdancanto, pulteatro, glavmanĝanto, falsludanto — sed nature: Tempopunkto.

Senpera verbigo de la adjektivoj riĉa, juna, bela, longa — ne devas esti uzata kiel rimedo por mallongigi la frazon — riĉas, belas, longas antaŭ esti riĉa, esti bela, esti longa. La verbigo devas enteni en si kvazaŭ aktivan elementon, stato

transformita en dinamismo. Ekz. La montoj bluas. La insulo grandis. Li kvazaŭ junis . . . Pro la foreco la montoj alprenis bluan koloron; La insulo impresis granda, kiam subite ĝi elstaris el la nebulo; Li ne estis juna, sed lia radianta rideto donis al li junecan aspekton, kvazaŭ estis iu ŝanĝo . . . Fojnejo anst. fojnujo.

Kvankam la aŭtoro estas pastro, la enhavo tute ne estas pruda, kiel montras la ĉarmaj poemoj: En distro, En pensoj, Surprizo. Aliflanke la religia parto estas tre pensveka.

Laste mi volas emfazi, ke la libro estas facile legebla, interesa kaj varia laŭ enhavo, kaj donis al mi multe da plezuro. Mi volas ĝin rekomendi al studcirkloj kaj opuloj kiuj ŝatas bonan kaj interesan literaturon. La libro cetere estas bele ilustrita per la originalaj desegnaĵoj. Prezo ne indikita.

Fine provon de poemo:

«Hirundo alvenas,
kun ĝi motacil',
aŭtune ĝi tamen forflugas.
Alaŭdo silentas
kaj per la flugil'
al sudo de neĝo ĝi fuĝas.
Pasero fidelas, ĉar plaĉas al li
prefere la hejm'
en la lok' tie ĉi
en kiu naskiĝis li iam».

(Sivle).

H.Fr.

CIGANA ROMANCARO

de Federiko Garcia Lorca
tradukita de Fernando de
Diego (parte de Henri Vatre)
Eldonita de Stafeto 1971.

La 400-jara genealogia arbo de la granda hispana poezio disbranĉas de la

prapoetoj Juan de la Cruz, Miguel de Cervantes Saavedera kaj Lope de Vega. Mi ĵus fermis la lastajn foliojn de la verko Cigana Romancaro de Federico Garcia Lorca. Aliaj karakterizas lin posteulo de Lope de Vega, la fama hispana klasikulo de la «Romancero», la olda hispana heropoezio. Garcia Lorca fariĝis la nova popolpoeto de la hispanoj antaŭ ol li estis murdita en la fatala horo de la hispana respubliko somere 1936.

En Cigana Romancaro Garcia Lorca fantazie kaj drame prezentas aktojn de la vivo en sia Andaluzio. Per la romanca formo rakonta kaj lirika li interpretas la eternajn temojn de vivo, morto, angoro kaj amo. La verko respiegulas Andaluzion kun ties ciganoj, ĉevaloj, ĉefangeloj, murdoj, vulgareco kaj sankteco. La tristo cigana kaj la mistero ŝvebas super ĉio. En lia poezia lingvo estas terminologio riĉa de simboliko kaj metaforismo. Eble nur hispanoj vere sentas la etoson de liaj poemoj kaj komprenas lin.

En antaŭparolo William Auld kaj en enkonduko la tradukisto Fernando de Diego faciligas al la esperantistoj la komprenon de la verko. La esperanta traduko de Cigana Romancaro superas la norvegan tradukon de la sama verko rilate la poezian formon. Se vi aĉetas la esperantan, vi nepre aĉetu la norvegan tradukon por komparo kaj kompreno. (Spanske dikt ved Solveig Kaurin, Johan Grundt Tanum, Oslo 1946). Fernando de Diego lerte sukcesis ritme redoni la strofojn kaj la asonancojn de la romanoj. Mi diras kiel Adamo en «La tragedio de 'l homo» de la hungara Emeriko Madach:

«La arto plej perfektas se ĝi tiel
sin kaŝas, ke ni ĝin eĉ ne rimarkas.»

Johan Matland.

Ekzamenoj

Supera ekzameno en Decembro 1971.
Tradukaĵo.

LYKKENS SKJORTE.

En orientalsk monark, etterkommer av den store Harun al Rashid, var rik og mektig som sin stamfar, men han var ikke lykkelig. Han gikk til en gammel dervisj og ba den vise mannen gi ham et råd så han kunne bli lykkelig.

Den gamle svarte at lykken var sjelden i denne verden, men han kjente et middel til å finne den. «Si meg det!» sa fyrsten.

«Her er midlet,» sa dervisjen, «Du skal ta skjorta til et lykkelig menneske på kroppen din.»

Fyrsten kysset den gamle vismannen og gikk bort for å finne sin talisman.

Han besøkte hovedstedene på jorden, han prøvde skjortene til hoffmenn, konger, keisere, men det gjorde ham ikke lykkeligere. Så kledde han på seg skjortene til handelsmenn, soldater, kunstnere. Alle anstrengelser forgjebes!

Han ville fange lykken, men den var ikke til å fange.

Håpløs, vandrende tilbake til sitt rike, ser han en gang en fattig bonde som holder på å pløye jorden, leende og syngende. «Jeg tar ikke feil, der er den jeg søker,» tenkte han. Han nærmet seg bonden: «God dag, er du lykkelig?» «Ja,» svarte den pløyende.

«Du klager ikke over noe, du ønsker ikke noe?» «Nei!»

«Ville du ikke bytte din skjebne med kongen?» «Aldri!»

«Godt, så selg med skjorta di!»

«Skjorte? Jeg eier ingen skjorte.»

*

Elementa ekzameno en Decembro 1971.
Tradukaĵo.

Når Frederik den andre av Preussen (1) hilste på en ny soldat, stilte han alltid disse tre spørsmålene:

«Hvor gammel er du? Hvor lenge har du vært i min tjeneste? Får du lønn (2) og klær i rett tid?»

En gang var en ny polsk soldat der, men han kunne ikke et ord tysk. Hans kaptein (3) lærte ham de tre spørsmålene, og fikk ham til å lære utenat (4) de tre nødvendige svarene. Kongen kom, men ulykkeligvis byttet han om det første og det andre spørsmålet.

«Hvor lenge har du vært i min tjeneste?»

«Tjue år, Deres Majestet.» (5)

«Å, tjue år? Slik ser du ikke ut. Hvor gammel er du?»

«Ett år, Deres Majestet.»

«Hm,» mumlet (6) kongen, «en av oss er sikkert gal.» (7).

«Begge, Deres Majestet,» svarte polakken.

1) Preussen = Prusujo

2) lønn = salajro

3) Kaptein = kapitano

4) utenat = parkere

5) Deres Majestet = Via Moŝto

6) mumle = murmuri

7) gal (:sinnsyk) = freneza.

Elementa ekzameno en Decembro 1971
Diktaĵo.

Farmisto Petersen kaj lia filo devis krevigi ŝtonegon sur la kampo. Kiam la dinamito estis metita en la truo, neniu el ili deziris bruligi la meĉon, ĉar ambaŭ estis tre timemaj pro la eksplodo. Post kelka tempo ili interkonsentis, ke la filo bruligu ĝin, ĉar li povis kuri pli rapide. Li kuŝiĝis surgenue, kaj prenis la alum-

etojn. Samtempe la patro kriegis: «Averton! La meĉo brulas!» kaj kuris al antaŭe decidita fosaĵo. Kiam ili ensaltis en la kaŝejon, ili ekkuis spiregante. Kiam la spiro iom retransviligis, la pensoj komencis labori, ĉar ili aŭdis nenium krevigon. «Vi ja bruligis la meĉon?» Petersen demandis al sia filo. «Ne-e,» sonis la respondo, «mi ne havis sufiĉe da tempo.» Krevigi = sprengi (krevi = sprekke) Meĉo = lunte, veke Kraki = brake, smelle.

Mono el Italujo!

En numero 9/10 de via estimata Revuo «Norvega Esperantisto», mi legis artikolon de samideanino Elna Matland, sub la titolo: «Kie troviĝas la oferemaj esperantistoj?» La artikolo estas adresita al norvegaj esperantistoj, tamen mi tuj decidis sendi 300 kronojn al vi, sen atendi tri jarojn.

Tio ĉar pasintjare, kiam mi venis al Norvegujo, la esperantistoj el Hamar tre helpis al mi por trovi Alvdal, kie troviĝas mia korespondamiko, kaj ankaŭ kiel danko pro eldono de miaj poemoj.

Hodiaŭ mi sendas 199 kronojn. Aliaj 101 venos pli poste.

La 199 kronojn sendas:

Lina Gabrielli L. 10.000
Brandimarte Ada L. 4.500
Brandimarte Alberto L. 2.000
Centro Esperantista Piceno	.. L. 1.500

L. 18.0000

Lina Gabrielli.

KUPONLETERAJ PREMIOJ

Iom post iom — sed tre malrapide — alvenas kuponoj kun aldonitaj 5 kronoj. Ni danke kvitancas por la ricevitaj kronoj. Nun ni posedas 100 kronojn kiel netan rezulton, kaj tio estas eta sed bona komenco por fortigi nian ekonomion. Multaj kuponleteroj estas dissenditaj. Bonvolu pozitive reagi! Kelkaj respondintoj pagis du kuponojn — koran dankon! — aliaj igis ankaŭ la edzinon pagi unu kuponon — koran dankon! Du personoj ne volas partopreni en «leterĉeno» (sed tamen pagis). Ni povas trankviligi ĉiun: ne temas pri leterĉeno, ĉar ĝi haltas post dek kuponoj. Estas nur interna «kronulado» kun premioj.

Jes, premioj! S-ino Lilly Davanger en Bergen ĵus ricevis la belegan ilustritan libron «La marvirineto» de H. C. Andersen, kaj s-ro R. Kjøingsen, Valaskjöld apud Sarpsborg, ricevis salujon kaj piprujon.

Norvega Kroniko

Oslo

15/11.71. Okaze de la 55-a datreveno de la fondiĝo de nia klubo aranĝiĝis Kultura Vespero en la festsalono de la KFUM-domo.

Post enkondukaj vortoj, la prez. Annalise Rees legis «La tutmondan egoismon», prologon verkitan de Piet Hein al la festo de UN.

Ni havis la grandan plezuron havi ĉe ni la Kulturskabenon de Oslo, Dagfinn Austad, kiu norveglingve parolis pri «Kulturpolitikken i Oslo». Antaŭ la prelego li

disdonis al la ĉeestantoj super-rigardon pri la kulturbudĝeto por Oslo por la jaro 1971. Li komentariis la diversajn konterojn, ekz. bibliotekojn, artkolektojn, muzeojn, teatrojn k.t.p. Li admonis la ĉeestantojn fari komentariojn aŭ demandojn, kaj li ricevis, interalie de Stein Winge, kiu laboras kiel reĝisoro en Nationalteatret kaj La Opero.

Dum la kafopaŭzo aŭdiĝis muziko kaj Esperantaj kantoj per sonbendo, prizorgita de Otto Prytz. La ĉeestantoj ankaŭ rigardis la ekspozicion de Esp.libroj k.t.p.

Post la paŭzo John Berggreen enkondukis al diskuto pri la temo «Lingvo kaj kulturo». La diskuto estis tre vigla, multaj partoprenis, kaj s-ro Austad zorgeme respondis al la diversaj demandoj kaj rimarkigoj.

Ĉeestis proks. 70 personoj.

7.12.71. Dezirante koran bonvenon al la lasta klubkunveno antaŭ Kristnasko, kiu samtempe estas Zamenhof-tago, la prez. Annalise Rees proponis kiel «Vortojn por pripenso» ke ni kantu «La Himno»n. Ni ankaŭ kantis la «Kluban Marŝon».

La ĉefpunkto de la hodiaŭa programo estis prelego de nia propagandestro Thor Magnus Carlsen pri «Esperanto, EEC kaj norvega gazetaro». Li komencis menciante la konkuradon inter la angla kaj la franca lingvoj, kiuj ambaŭ postulas esti la plej grava kaj taŭga por la Komuna Merkato. Nia

«presto» tre serioze kaj diligente laboras. Li skribas artikolojn kaj vizitas la gazetojn. Plurfoje li iniciatas diskutadojn pri Esperanto en la gazetoj, kaj li montris al ni eltondaĵojn de artikoloj aŭ kontribuoj (respondoj de la publiko), kiuj aperis en proks. 10 ĵurnaloj dum la lastaj monatoj.

Per forta aplaŭdo la ĉeestantoj montris sian admiron kaj entuziasmon pri la bonega laboro farita de T. M. Carlsen.

Nia bulgara gasto tre bele ludis por ni per piano kvodlibeton de konataj melodioj, kaj ankaŭ kelkajn bulgarajn popolkantojn.

Okaze de Kristnasko ni komune kantis «Mi venas al la alt-ĉiel». R. Grotmål akompanis per gitaro.

Harda Danielsen

Sauda

Klubkunveno ĉe ges. Matland 22/11-71.

La sekretario laŭtlegis referaĵojn de la lasta klubkunveno kaj de la Esperanto sur Haukelimonto. Norman Birkeli legis el Esperantobladet de la jaroj 1938—1939 pri okazaĵoj pri la kluboj en nia regiono. Inter alie ni ekciis, ke dum la landa jarkunveno pentekoste 1939 en Sauda Turisthotel (nun Sauda Fjord Hotel), la tuta prezo por unu persono dum 2 tagoj, tranoktado, manĝaĵoj kaj kotizo kostis 25 kronojn!


Post la manĝopaŭzo ni distris nin per Esperantaj taskoj, kiuj temas pri tradukado de malfacilaj frazoj kaj esprimoj. La intenco de

tiuj taskoj estas solvi ilin hejme, kaj la plej multaj geklubanoj faris tion, pli kaj malpli bone - - -. Estas la prezidantino, kiu eltrovis kaj elpensis la taskojn. Poste ni kantis «Fritjof kaj Carmencita». Tiu ĉi kanto estas tre bone tradukita de sveda al Esperanto de Olov Johansson kaj dediĉita al Sauda Esperantoklubb. Johansson instruis Esperanton en nia klubo en la jaroj 1938—1939. Unu el niaj klubaninoj havas ankoraŭ skriban kontakton kun li . . .

Sekr.

Sarpsborg

En novembro La Urso festis sian 20-jaran ekziston. En la festeno lektoro J. Hammond Rosbach resumis en mallonga parolado la ekston kaj la historion de la klubo kaj dankis siajn diligentajn kaj afablajn kunlaborantojn. La sekretario, Th. Resberg, paroladis por la prezidanto, kiu samtempe kun la klubo festis la saman jubileon, kaj transdonis al li florbukedon en la nomo de la membraro. Li ankaŭ transdonis florojn al la tri anoj, kiu estas fidelaj de la unua tago antaŭ 20 jaroj, nome Ragnar Kjøningsen, Karsten Langsholt kaj Terje Myhre. Kiel reprezentanto de la urbo Sarpsborg alvenis s-ro Nils Borgaas, prezidanto de la Kultura komitato de la urbo. Li faris tre belan paroladon kaj transdonis



florojn al la prezidanto. Li sub-
strekis, ke oni en Sarpsborg estas
atentaj pri la grava kultura laboro,
kiun faras la lokaj esperantistoj.
Cetere ambaŭ gazetoj de la urbo
prezentis intervjuon kunlige kun
la jubileo, «Sarpen» eĉ tulpagan
intervjuon.

*

La Urso aĉetis malnovajn numer-
ojn de Norvega Esperantisto por
dek kronoj (kiuj kompreneble eni-
ras la ekonomihelpan kason de la
gazeto). Ĉiu membro ricevis po
unu ekzemplero, kaj devas — kiel
hejmtaskon por la venonta kun-
veno — eltondi vortojn el la
gazeto kaj kunlui la vortojn, tiel
ke la rezulto estos letero. Ĉar ni
ne atendas, ke ĉiu faros tion, ni
daŭrigos la tondadon kaj la glua-
don en la kunveno. Ĉi tion ni in-
formas, pensante, ke eble ankaŭ
aliaj kluboj povos utiligi la ideon.

La diferenco

De tempo al tempo ni petis, ke oni
filatele afranku la leterojn al ni. Tio

ne estas nura malplena frazo. Atentu ĉi
tiun ekzemplon: Ne estas eble vendi 20
ordinarajn 70 øre-poŝtmarkojn por 1 øre.
Sed estas eble vendi *unu* (bele stampitan)
70 øre-pm el la diversaj jubileaj serioj

por 10 øre. Se vi estas bona matematik-
isto, vi facile kalkulas, kiom ni bezonas
da ordinara pm por egalvaloro de
unu «neordinara» pm. Kaj se vi uzas
aliajn valorojn ol 80 øre (ekz. 40, 50,
60 øre), tio kreskigas la eblecojn.

NORSK ESPERANTO-FORBUND (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30
Turisma Servo: Boks 942, Oslo
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.
Telefono: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:
Boks 942, Oslo 1.

Trykt hos A. Sæther A.s - 2300 Hamar